| | |
|---|---|
| SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio | El Vol. 27 n-ro 4(120) 30.08.1976. |

# Internacia turismo de la esperantistaro

T. TYBLEWSKI

(JELENIA GÓRA, POLLANDO)

## ENKONDUKO

En la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj la artikolo 13 tekstas: 1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato. 2. Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando inkluzive la propran kaj reveni en sian landon.[1)]

Depost la dua mondmilito la turismo evoluas tre intense. Nuntempe - laŭ la konstato de la ĉefa teoriulo prof. Walter Hunziker[2)] - la turismo estiĝis *viva neceso* de la homoj.

Amasa eksplodo de la turismo, kvankam ĝi koncernas nur kelkajn regionojn de la mondo, kaŭzas efikojn en diversaj vivosferoj. Plej bone estas konataj la ekonomiaj. Tamen konsekvencoj de la turismo koncernas sociajn rilatojn en tre larĝa senco.

## DIFINOJ

Profitante la ĝisnunajn konstatojn de pedagogio, psikologio kaj sociologio, ni akceptu, ke *turismo* estas ĉiuj fenomenoj de la spaca movado, motivata per libervola portempa ŝanĝo de la estadloko, de la medio, de la vivritmo kaj pro senpera kontaktiĝo kun la vizitata medio.[3)]

La spacan movadon oni povas klasifiki laŭ jenaj kriterioj:

1. personoj aŭ sociaj grupoj,
2. tempo de la turismado,

3. individua aŭ kolektiva karaktero,
4. metodoj,
5. direktoj de la elvenoj kaj alvenoj,
6. celoj,
7. transportiloj.

Taksante turismon laŭ la kriterioj, oni devas:

1. scii pri aĝo, sekso, instruo, soci-profesia aparteneco, nivelo de enspezoj de la turisto,
2. preni en konsideron en kiu sezono oni turismas, ĉu longtempe, ĉu semajnofine aŭ dum libertempo aŭ festotage,
3. koni ĉu individue, en grupo, kiomnombre,
4. scii ĉu specialece (kun necesa aparta lerteco) aŭ ne,
5. atenti de kie kaj kien venas turistaro (enlande, eksterlande, elvene, alvene),
6. memori, ke oni libervole ŝanĝas sian estadlokon por:

TURISMO laŭ nuntempa koncepto, akorde kun la difino:
a) enspezi
b) verki
c) aranĝi diversajn aferojn
d) kulti (religie, ideologie)
e) partopreni kongresojn, konferencojn
f) sporti
g) saniĝi
h) ekkoni kaj *travivi* per senpera kontakto kun:
   1. la naturo
   2. la kulturo
   3. la socio
i) ripozi (rekreiĝi)

(TURISMO laŭ tradicia kompreno: h) kaj i))


7. scii ĉu oni veturas survoje, surakve aŭ en aero (ekz. bicikle, ŝipe, aviadile).

MOTIVARO

Oni diferencigas objektivajn kaj subjektivajn faktorojn de turismo. La unuaj ligiĝas kun la turisto mem, kun valoroj de la vizitota loko kaj kun organizo de la elveno.

La duaj estas *motivoj*, kiuj dependas de la objektivaj faktoroj, sed devenas el la psiko de la turisto.

La decido elveni (eliri, elveturi, elflui, elflugi) turisme estas determinita de:




Turisman motivaron oni povas grupigi en jenajn kategoriojn:

1. el la deziro *viziti* iun lokon, regionon, landon, medion;
2. el la deziro *lasi* portempe sian konstantan loĝlokon;
3. el la deziro *kunestadi* kun iu ekster la konstanta loĝloko.

(Ni memorigu - motivo estas la emocia streĉo ligita kun iu agado, kun la stato de aktivado, kiu sekvos.)

La deziro viziti povas esti motivata diverse: a) por ekkoni aŭ kontaktiĝi kun naturo, kun kulturo, kun personoj, b) por travivi belon, majeston, aliecon de la vizitota medio. Ĉi-devena motivaro estas la plej grava rilate al *edukaj* celoj de la turismo, ĉar ĝi koncernas tuton de la turismaj celoj kaj aktivigas ĉiujn psikajn procezojn de la turisto.

Tamen la motivoj ne ĉiam estas distingeblaj kun sufiĉa certo. Estas relative multaj okazoj, kiam la turistaro vojaĝas pro snobismaj kaŭzoj, venante ien nur pro la bezono imiti aliulojn. Estadas tamen situacioj, kiam la snobisma motivaro transformiĝas en la pli profundan, devenantan el aŭtentaj - komprenataj kaj sentataj - deziroj.

Oni emas lasi sian loĝlokon pro la bezono apartiĝi de la familio, de la lokaj interrilatoj, de la konkretaj devoj. Oni lasas siajn klopodojn, oni supozas trovi la deziratan ŝanĝon, novajn impresojn, alian ritmon de la vivo.

La tria kategorio de la motivoj koncernas deziron kunesti en ies akompano alimaniere ol en la lokaj kondiĉoj. Al tia turismo apartenas ekz. la postnupta vojaĝo, ekskurso kun la ĉefoj aŭ kun amikoj.

## TRAVIVADO

La turismo estas riĉega fonto de diversaj sentoj, permesantaj al turisto travivi sian rilaton al si mem kaj al la ĉirkaŭa medio.

Ĝi estas sfero de tre diferencaj travivoj - en diversaj ligoj kun aliaj psikaj procezoj (la konecaj, la volecaj).

Tio, kio decidas pri la porviva signifo de sentoj estas ilia influo je agado. La sentoj povas esti stimulo kaj motivo de la agado, ili ankaŭ povas ekigi la staton de emocistreĉo ligita kun ekkonscio de iuj valoroj kaj celoj. Sed ili ankaŭ povas esti obstaklo en efika strebado al iu celo, la bremso de aktiveco aŭ eĉ la haltkaŭzo.

Oni diferencigas la sociajn sentojn (la moralajn), la estetikajn, la intelektajn (interesemo, dubemo). En la turismo tre gravas, ke la sentoj estu *plezuro*, kiu aperas dum la plenumado de bezonoj, i. a. dank'al ripozo kaj sano. Grava fakto estas ankaŭ tio, ke la sentoj pozitivaj (plezuro) altiras la homon al siaj fontoj, stimuloj, kaŭzoj. Laŭ la eduka vidpunkto ĉi tiu fakto meritas plej grandan atenton. La sentoj influas ja eĉ la direkton de la homa aktivado, ligante lin (ŝin) kun la pozitivaj celoj, kaj evitigante disde la negativaj.

La praktiko de la turismo ŝajnas atesti pri la nesufiĉa komprenο de la organizantoj koncerne al la senco de travivado.

KARAKTERIZAĴOJ

En la monda skalo *viroj* formas plimulton (du trionojn) de la turistaro. Se oni tamen subtrahos la veturantojn interescele, la plimulton de turistoj vojaĝantaj plezurcele formas *virinoj*. Ĝuste ĉitiu speco de la turismo plej evoluadas kaj la atentiga inecigo de la turismo estas observata en la plej gravaj regionoj - en Usono kaj en Eŭropo.

En la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Nordameriko dum la 1956-1965. la virinoj ricevis 56% da pasportoj. Laŭ British Travel Association en la jaroj 1964/65. la virinoj turismis en 54%. En Novzelando - 53%. La virinoj de Federacia Germana Respubliko estis 65% de la tuta turistaro, dume en Finnlando (Suomio) - eĉ 75%.[5)]

La turistinojn oni povas dividi en tri kategoriojn:

en la aĝo de 18-24 jaroj - kiel la personoj sendependaj - ili vojaĝas pli ofte ol la viraj samaĝanoj, kiuj ĉi-tempe militservas aŭ preparas sian vivpozicion.

En la aĝo de 25-45 jaroj ili estas plejparte la akompanantinoj de siaj edzoj, sed pro la familiaj devoj ili vojaĝas malpli ofte ol la viroj.

En la aĝo post 45-a jaro, kiam ili stabiliĝas, la turistinoj

denove vojaĝas pli. Por multaj la turismo ekiĝas la ĉefa pasio kaj la vivaktiviga faktoro.

Estas ankaŭ konstatita fakto, ke la virinoj plejparte decidas pri la elekto de turisma transportilo, speco de loĝado kaj - preskaŭ escepte pri - speco de aĉetado. Ili ankaŭ tre vigle reagas je la turisma reklamo. Esploritaj - la virinoj de ĉefaj regionoj - konfesis, ke la ĉefa atrakciaĵo por ili estas en la turismo la ekkono de novaj personoj kaj ŝpardona aĉetado.

La rapida evoluo de internaciaj kontaktoj kaŭzis, ke pli kaj pli gravas tn. turismo porokaza, en kiu partoprenas ĉiuj personoj vojaĝantaj kun la celoj 6.a,c,d,f (laŭ la listo sur la 116-a paĝo) - okaze profitantaj la liberan tempon por ekkoni novan medion.

Tamen oni observas simptomojn de la turisma patologio, kiu efikas el la rapideco kaj abundeco, pro kiuj centmiloj da vojaĝantoj preteriras la plej altajn valorojn de la monda kulturo kun iu sporta deziro de kvanta atingo.

"Ne estas la intenco, ke la tn. kultura turismo anstataŭu la ĝeneralan turismon, kies celoj plej ofte estas ripozo kaj suno (komparu sur la 116-a paĝo - TT), sed la ideo estas suplementi tiujn lastajn celojn per la aliaj (...) oni klopodu, ke turista vojaĝo al iu lando rezultigu gradon de scio pri tiu lando, ĉefe aktuala scio pri la lando, pri ties popolo, ĝeneralaj vivkondiĉoj, sociaj rilatoj ktp."[6]

Alia simptomo de la patologio estas manko de aŭtenta kontakto de la turistaro kun la loĝantoj pro kelkaj kaŭzoj, inter kiuj la lingva apartenas al la plej gravaj.

Turistoj ofte revenas el iu loko, memorante nur la kuriozaĵojn sen iu ajn vera kono de la vizitita medio. Ne mankas ankaŭ situacioj, kiam la turistaro profitas aŭ eĉ ekspluatas naturajn kaj kulturajn valorojn de la vizitata medio, tute neglektante aŭ eĉ malestimante la mastrojn de la regiono pro rasaj, religiaj aŭ naciaj antaŭjuĝoj.

La observataj kaj registrataj faktoj de naturdetruado (polucio) okazas - kiel konstatas *sozologio* - ankaŭ kun partopreno de la turistaro.

## ESPERANTO EN TURISMO

Kvankam esperantistoj aplikadas la Internacian Lingvon ankaŭ en la lokaj, enregionaj kaj enlandaj rilatoj[7], la esperantismo mem im-

plicas internacian turismon kiel la plej akordan kun siaj ĉefaj celoj. Esperantistoj havas specifan vojaĝmotivon, kiu efikas el la bezono uzi Esperanton en evidenta situacio, t.e. en la grupo de diversnaciaj eksterlandanoj.

Modifante do la difinon de la turismo (115-a paĝo) oni povas konstati:

*Turismo de esperantistoj* estas fenomeno de la internacia spaca movado, motivata per libervola portempa ŝanĝo de la estadloko, de la vivritmo, de la medio kaj pro senpera kontaktiĝo kun la vizitata medio, ĉefe kun ĝiaj loĝantoj aŭ gastoj-per la internacia lingvo.

## EL LA HISTORIO

Laŭ la vidpunkto de la relative mallonga historio de la Esperanto-movado la plej fruaj turismaj vojaĝoj ligiĝis kun la celoj 6. h/2,3 (vidu la 116an paĝon), t.e. ekkoni kaj travivi per senpera kontakto kun kulturo kaj kun la socio. Oni rajtas supozi, ke kontakto kun la naturo estadis nur la pera rezulto de esperantistaj alvenoj al iu medio.

Jam en la jaro 1900-a la franca Touring Club ekuzis la internacian lingvon, publikigante en siaj eldonaĵoj konvenajn artikolojn. Depost la unua Universala Kongreso de Esperanto (1905. - Boulogne-sur-Mer) daŭre disvastiĝas utiligo de la internacia lingvo por turismaj celoj.

Universala Esperanto-Asocio en la jaro 1908., dividinte sian laboron en tri fakojn, konsideris la *turismon* (krom administrado kaj E-konsuloj) unu el ili.

"La celo de la Asocio estas la plifaciligo de ĉiuspecaj rilatoj inter diverslingvanoj kaj la kreo de fortika ligilo de solidareco inter la membroj... En la lokoj, kie por tio ekzistas ebleco, unu el la membroj estas delegito (...) kaj li libervole plenumas diversajn praktikajn servojn por la membroj, kiuj sin turnas al li."[8)]

Tiel la delegitoj estiĝis unika servoreto, kiu rajtas informi pri la komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajroj, turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj[9)] - ĉiun esperantiston, kiu petos la koncernajn informojn. Principe tre utila servo, ĝi kaŭzis tamen iaspecan socian apartecon de la esperantistaro, kiu priservante sin mem ne profitis la oficialajn inform- kaj servoficejojn de diversaj landoj.[10)]

En Svedio depost la 1927-a jaro okazis multaj organizitaj turistaj vojaĝoj per Esperanto, lanĉitaj far Ernfrid Malmgren. La 26-a Universala Kongreso en Stockholm (1934.) evidentiĝis sukcesa dank'al la Esperanta Turista Asocio, kiu organizis grupvojaĝojn. Ĝis la jaro 1975. inkluzive okazis 60 universalaj kongresoj de Esperanto - ĉiuj, krom kelkaj esceptoj, en la ĉefurboj aŭ en la plej grandaj urboj de la koncernaj landoj:

Aŭstrio (3), Belgio (3), Britio (7), Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Danlando (3), Finnlando (2), Francio (5), Germanio (6), Hispanio (2), Hungario (2), Italio (2), Japanio, Jugoslavio (2), Nederlando (4), Norvegio, Pollando (5), Svedio (2), Svislando (5), Usono (3).

Gravan rolon okupis turismo en la agado de UEA jam de la plej fruaj jaroj; ĝia turisma servo iniciatis eldonon de multaj prospektoj kaj broŝuroj, da kiuj aperis ĝis nun pli ol 1.200 en Eŭropo, Azio kaj Ameriko.

Post la lasta milito rimarkinde plimultiĝis la nombro de esperantlingvaj turismaj prospektoj, de la filmoj, de specialaj E-aranĝoj kun pure turisma karaktero kaj dank'al karavanoj el ekster Eŭropo pli internaciiĝis la partoprenantaro de la kongresoj.

Krom la universalaj kongresoj regule okazas dum jaroj ankaŭ aliaj internaciaj kongresoj, konferencoj, seminarioj, kursoj, turismaj aŭ sportaj aranĝoj kaj alispecaj renkontiĝoj, organizataj aŭ far UEA aŭ far aliaj asocioj kaj societoj. El tiuj lastaj la plej grava estas la ĉiujara kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (okazis 46), la kongresoj de fervojistoj (okazis 25) aŭ de Tutmonda Esperantista Junulara Organizaĵo (okazis 28).

En la jaro 1972. da ili okazis 52 en 24 landoj kun la partopreno de 12 mil personoj.[11)] Al la plej famaj kaj plej renomaj apartenas: Someraj Esperanto Universitatoj en Gyula (Hungario - 14), Internacia Esperantista Feriado en Międzygórze (Pollando - 12) kaj Kursoj en Kulturdomo Grésillon (Francio).

KATEGORIOJ DE LA ESPERANTA TURISMO

Taksante la turismon de esperantistoj laŭ la plej tipaj motivoj, oni povas konstati, ke ĝi okazas ĉefe pro la deziroj *viziti* novan medion aŭ *kunestadi* (kun esperantistoj) ekster la konstanta loĝloko (vidu sur la 117-a paĝo).

Laŭ la kriterioj de klasifikado (vidu paĝon 116. k 117.) oni rimarkas, ke la esperantistaro turismas ĉefe en la plenaĝeco kaj plejpar-

te ili estas viroj kun meza kaj supera instruoj. Profesie superas instruistoj kaj diversspecaj oficistoj. Laŭ du fontoj[12] oni povas fari jenan tabelon:

| Aĝo | Nombro | | |
|---|---|---|---|
| | "Scienca Rev." | "Esperanto" | Kune |
| ĝis 25 | 11 | 16 | 27 |
| 26 - 35 | 33 | 29 | 62 |
| 36 - 45 | 58 | 44 | 102 |
| 46 - 55 | 46 | 40 | 86 |
| 56 - 65 | 75 | 53 | 128 |
| pli ol 65 | 42 | 44 | 86 |
| Sume | 265 | 226 | 491 |
| Virinoj | 73 | 93 | 166 |

Karakteriza supereco de turismantaj esperantistoj en aĝo de 36-45 kaj 56-65 jaroj konfirmas la ĝeneralan fenomenon, sed spitas la nombro de virinoj ĉi-aĝaj, kiuj inter la esperantistaro formas nur preskaŭ 34 % malplimulton (vidu sur la 119-a paĝo). Esperantistoj vojaĝas plej ofte dum la libertempado, kiu en Eŭropo kaj Ameriko okazas en la monatoj junio, julio kaj aŭgusto. Relative malpli ofte ili turismas vintre. Laŭ la turisma Esperanto-Kalendaro por la 1976. el inter 124 internaciaj aranĝoj 70 okazos somere kaj nur 5 vintre; la ceteraj - printempe kaj aŭtune.[13] Meza longeco de la esperantista elveturo daŭras 3 semajnojn (21 tagojn).

Esperantistoj plej ofte vojaĝas individue aŭ en kelkpersonaj grupoj. La fenomeno efikas pro internacia konsisto de la partoprenantoj de la turismaj aranĝoj kaj pro la relativa malofteco de tn. karavanoj, kiuj estas organizataj ĉefe por kune veturi al la kongreslando el sia lando. La grupa veturado tamen plioftiĝas.

Kvankam la kono de la internacia lingvo estas aparta scipovo de la Esperanta turismo, ĝi principe ne influas la manieron turismi, tial oni konsideras la turismon de esperantistoj - la nespecialeca (sen aparta strikte turista lerteco).

Esperantistaro veturas antaŭ ĉio al la kongreslando, kie ĉiun jaron grupiĝas meze 2.500 reprezentantoj el pli ol 30 landoj. Por sia socia portanto Esperanto estas rimedo de la internacia kompreniĝo ĉefe ekster la propra lando, kio kaŭzas, ke la esperantista turistaro prefere venas el la sia kaj alvenas al aliaj landoj - tiuj, kie okazas internaciaj aranĝoj, do ĉefe en Eŭropo.

Kiel jam estis dirite, celoj de la nuntempa turismo de esperan-

tistoj ampleksas ĉefe tiujn: 6. d,e,h 1.2.3., kio signifas, ke oni veturas eksterlanden por: partopreni kongresojn kaj konferencojn (e), kulti la personon kaj verkon de Zamenhof (d), ekkoni kaj travivi ion per senpera kontakto kun la naturo, la kulturo kaj la socio. Relative malpli ofte esperantistoj vojaĝas por aranĝi diversajn aferojn, saniĝi kaj ripozi. Preskaŭ entute ne por enspezi, verki kaj sporti.

La plej ofte aplikata transportilo estas trajno, sekvas aviadilo kaj propra aŭtomobilo. Aliaj transportiloj estas uzataj multe pli malofte.[14)]

ESPERANTO - LA TURISMA LINGVO

La turismo estas vasta kampo por amasa utiligo de la internacia lingvo. La evoluo de la internacia turismo kun la partopreno de multaj socigrupoj ŝajnas nerealigebla sen la uzo de simpla kaj neŭtrala lingvo. Kiel efikas el la supra prezento de la turismaj kategorioj, la vojaĝoj de la esperantistaro apartenas plejparte al la tn. kultura turismo (vidu sur la 119-a paĝo), kiu manifestiĝas i.a. en prelegoj de Internacia Somera Universitato, en belartaj konkursoj, en teatraj kaj filmaj prezentadoj, en koncertoj kaj folkloraj dancoj, en kongreslandaj artaj vesperoj kaj en internaciaj festivaloj. Al kategorioj de la kultura turismo apartenas ankaŭ la tn. postkongresaj ekskursoj, aranĝataj aŭ en la kongresa lando aŭ en iu najbara.

Pro la lingvoscience konstatita taŭgeco de Esperanto por internaciaj rilatoj, ni rezignu pri la filologia argumentado koncerne al la internacia lingvo, konsiderante nur, ke - lernita - ĝi perfekte funkcias ankaŭ en la turisma komunikado kaj en la turismaj interagoj. Esperanto jam multflanke elpruviĝis kiel lingvo, per kiu oni transiras la tradiciajn barаĵojn de la rilatoj inter la loĝantoj kaj la alvenintoj. Ĉi-sence ĝi simple servas kiel rimedo, kies manko ekster la esperantista socio, malfaciligas aŭ eĉ malebligas la kulturan turismon, kiu en la nuntempa mondo ricevas pli kaj pli grandan signifon. La Projekto de la Skiza Plano por la 1973.-1978. de UNESCO antaŭvidis vastigon de la agado sur la kampo de la internacia vojaĝado de personoj interesitaj pri scienco kaj teknologio, edukado, kulturo kaj informado. Oni entreprenas apartan studon pri la eduka, scienca kaj kultura efikoj de eksterlandaj vojaĝoj, en kio UEA ankaŭ intencas partopreni i.a. per ĉitiu dokumento.

La internacia turismo estas nuntempe unu el la plej vastaj kampoj, sur kiuj scio de Esperanto donas multnombrajn praktikajn ser-

vojn, helpe de UEA-delegitoj kaj helpe de ĉiu esperantisto, kiu sen-interese apogas ĉiun alian renkontitan esperantiston. La turismo estas ankaŭ sfero, kiu prezentas plej multe da eblecoj por plua, multe pli amasa praktika utiligo de la internacia lingvo.

Kiel oni rajtas konstati, esperantistoj estas la solaj eŭropanoj, kiuj povas libere kompreni unu la aliajn sen lingvaj baroj. Al ili la mondo povas signifi iom pli ol al tiuj, kiuj ĉiam devas barakti kun lingvaj malfacilaĵoj.[15)]

La praktiko de la esperantismo konfirmis, ke la uzanto de la internacia lingvo ne nur evitas iajn ajn zorgojn provante interkompreniĝi eksterlande kun iu ajn esperantisto, sendepende de lia (ŝia) nacieco, sed ankaŭ trovas en la ebleco interkompreniĝi la fundamentan motivaron de sia ekturistiĝo.[16)]

KIEN STREBI?

Esperanto, pro siaj strukturaj kvalitoj, funkcias kiel integra faktoro. La facileco, kun kiu ĝi transportas informadon, ĝia socia portanto kaj relative vasta amplekso kaŭzas, ke la lingvo neniigas aŭ almenaŭ limigas en iuj medioj la naciajn aŭ la regionajn antaŭjuĝojn. Ĉitio influas la personecon de esperantistoj - permesas al ili ekposedi novajn kvalitojn de sia psiko. La kvalitoj de personeco plej bone esprimiĝas en tn. *sintenoj*, kiujn oni difinas:

Kaŝitaj en la dinamika stereotipo, relative konstantaj inklinoj konduti sammaniere rilate al difinitaj personoj, situacioj, fenomenoj ktp.

Dank'al la turismo oni povas iniciati kaj formi en si diversajn sintenojn, tre deziratajn por la celoj de internacieca edukado. Ŝajnas, ke pro la sociaj realoj, en kiuj esperantistoj vivas en siaj socioj kaj nacioj, la plej konforma sfero de ilia influado kaj samtempa memedukiĝo estas *kulturo*. La turismo (precipe la internacia) favoras, ke ĉiu esperantisto formu en si kaj evoluu la porkulturajn sintenojn.[17)]

Komenco de la ĝusta rilato al la kulturo devas esti agnosko de ĝiaj valoroj, taksataj senprofiteme, ĉefe pro la ligitaj kun ili travivaĵoj. Tian rilaton povas respeguli la sinteno de respekto por la kulturo. Ĝin devas kompletigi ekz. interesiĝo pri la kulturo, kontaktiĝemo kun la kulturo, admiro por belo kaj grandeco de la kulturo, partoprenemo en la kulturo, krea esprimiĝemo kaj kultura perfektige-


mo de la medio - kiel la konstantaj inklinoj, respegulataj en la sintenoj.

Aparta sfero de turismaj rilatoj estas *la naturo*, kun kiu tiel aŭ aliel kunestas ĉiu vojaĝanto. Sen la konforma rilato al ĝi, ĉiu turisto estas minaca difektonto de la naturo. Konsciaj pri danĝeraj efikoj de polucio, esperantistoj devus turismi tiel, ke ili aŭ evitu aŭ almenaŭ limigu la difektigajn rezultojn de sia spaca movado. Ŝajnas, ke povus helpi en tio la pornaturaj sintenoj, kiuj estu: respekto por la vivo, protektemo por la naturaĵoj, respondeco pri la natura medio, harmonia kontaktiĝemo kun la naturo, ŝatemo por la naturbelo kaj ŝatigado de la aliaj al naturo.[18]

Respondecaj pri sia rolo en la societoj, socioj kaj nacioj, esperantistoj devus konscii la objektivan fakton, ke ili mem povas roli ju pli sukcese, des pli da pozitivaj ecoj ili reprezentos per siaj personecoj. En la turismaj kontaktoj iliaj ecoj devus manifestiĝi ĝuste en la skizitaj sintenoj, kiujn ja ili antaŭe devus alpropriĝi kaj internigi.

Nesufiĉe ĝis nun rekonita rolo de la edukanto en la turismo povas esti atribuata al esperantistoj, kvankam oni devas memori pri diversaj faktoroj determinantaj la edukajn efikojn.

Kompletigante la skemon el la 117-a paĝo, ni konstatu, ke la faktoroj estas jenaj:




Ni akceptu, ke la edukanto estas (devus esti) ĉiu persono, kiu senpere aŭ nur pere respondecas pri iu ajn elemento de la turisma movado.

"La turismo estas malamiko de stereotipeco kaj aŭtomateco en la agado; ĉar ili ne elvokas miron, dubon, pripenson, kritikon de la aliaj kaj de si mem. La miro, ekinteresiĝo, dubemo, ekkomparo kaj ekraviĝo aŭ la protesto favoras revizion de nia kulturo, stimulas al la kreado."[19]

La turismo de esperantistoj postulas multfacetajn esplorojn, ĉar ĝia komplika internacia strukturo kaj diverselementa konsisto ne estas ankoraŭ ĝisfunde konataj. Tamen jam nun oni rajtas konkludi,

ke speco de la turisma travivado de la esperantistaro kunformas internaciige la personecon de la individuoj.

Karusel-vojaĝoj de H. Bakker (Nederlando) aŭ bus-linioj de A. Grzebowski (Pollando), se ne mencii kelkajn iniciatojn de la "Monda Turismo", konfirmas la provojn de la efika serĉado de specifaj turismaj formoj inter la esperantistaro. La formoj plene sukcesas koncerne al la uzantoj de la internacia lingvo. Tamen ŝajnas la postulo de la nuna epoko, ke esperantistoj mem ekapliku la elprovitajn formojn por la neesperantistaro, da kiuj milionoj atendas pli klaran celon de sia turismado.[20)]

BIBLIOGRAFIO


1) *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.* Roterdam 1963, UEA.
2) W. Hunziker: *Expansion et formation touristique.* Bern 1966.
3) K. Przecławski: *Turystyka a wychowanie (Turismo kaj edukato)* Warszawa 1973.
4) S. Gerstmann: *Psychologia.* Warszawa 1969.
5) F. Koltun: *Influance des femmes dans le domaine du tourisme.* "Tourisme Mondial" 1964, n-ro 62.
6) *Turismo kaj Esperanto.* "Norda Prismo" 1969, n-ro 3-4.
7) R. Corsetti: *Kie vivas la esperantista popolo?* "Heroldo de Esperanto" 1976, n-ro 6.
8) I. Lapenna, U. Lins, T. Carlevaro: *Esperanto en perspektivo,* London-Rotterdam 1974.
9) *Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio,* Rotterdam 1974.
10) T. Sekelj: *Trarompi la verdan kurtenon.* "Esperanto-Gazeto" 1967, n-ro 7.
11) *International Esperanto Gatherings in 1972,* Centro de Esploro kaj Dokumentado n-ro I/II/32-a.
12) T. Tyblewski: *Edukaj fenomenoj de la turismo.* "Scienca Revuo" 1975,n-ro 3. E.L.M. Wensing: *Kiu kongresas?* "Esperanto" 1976, n-ro 1.
13) *Turisma Esperanto-Kalendaro.* Bydgoszcz-Gdansk-Warszawa 1976, Monda Turismo.
14) E.L.M. Wensing: *Kiu kongresas?* "Esperanto" 1976, n-ro 1.
15) G. F. Makkink: *Lingvoinstruado post la jaro 2000,* "Eŭropa Dokumentaro" 1974, n-ro 1.
16) T. Tyblewski: *Eduka rolo de turisma ĉiĉeronaro.* Jelenia Gora 1974, doktoriĝa disertacio.
17) *El regionoj de la memo.* Jelenia Góra 1976, tajpaĵo.
18) *Edukaj fenomenoj de la turismo.* "Scienca Revuo" 1975, n-ro 3.
19) K. Wojciechowski: *Wychowanie dorosłych (Edukado de plenaĝuloj)* Wrocław 1973.
20) R. k M. Najera: *Propono al aktivuloj de la monda esperantistaro,* Mexiko 1972. faldfolio.